

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

Jarabono : 60 fkoj

1984 - 2

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon	
Esperanto tra la Mondo	
La Unuaj Enloĝantoj de Kanado	
Pri Niaj Literaturaj Trezoroj	Ĵak Le Puil
Poemo Kastelo Grésillon	Istvan Nagy
El la Programo de la « Kultura Periodo » en 1984	H. Röllinger
Paĝo de la Geknaboj	
Mediteranea Malto (1)	K. Mallia daŭrigota.
La Lumturo de L'Sango (1)	A. Daudet trad. A. Ribot
Por via distro	C. Cavalié
Gramatiko per bonhumoro	S. Guillot

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras, ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Pluraj personoj petis de ni la tagdividon dum la diversaj periodoj. Jen respondo al tiu peto :

Unua periodo : 9 h. 15 — 10 h. 45 : Seminario pri rektmetoda instruado de lingvoj — Kursoj.
11 h. 00 — 12 h. 00 : Prelego.
14 h. 00 — 16 h. 00 : Promenado aŭ ripozo aŭ arta manlaborado.
16 h. 30 — 17 h. 45 : Seminario Kursoj.
18 h. 00 — 19 h. 00 : Konversacio.
21 h. 00 : Distra vespero.

Al la jam anoncitaj prelegoj (vidu K.K. 1984-1) aldoniĝis : « Sicilio kaj la Mafio », « Kiel oni vivis en Anĵuo ĉe la komenciĝo de nia erao », « Ĉu malnovaj ritoj kaj simboloj konservas signifon en nuntempaj vivmanieroj ? », kaj aliaj.

Dua periodo : 9 h. 30 — 12 h. 00 : Kursoj (kun paŭzo).
14 h. 00 — 16 h. 00 : Promenado aŭ ripozo, aŭ arta manlaborado.
16 h. 00 — 17 h. 45 : Kursoj.
18 h. 00 — 19 h. 00 : Konversacio.
21 h. 00 : Distra vespero.

Tria periodo : 9 h. 00 — 10 h. 45 : Kursoj.
11 h. 00 — 12 h. 00 : Slojdo-aktivaĵoj.
16 h. 00 — 19 h. 00 : Slojdo-aktivaĵoj.
21 h. 00 : Distra vespero.

Kvara periodo : La ĉiutagan programon ni ankoraŭ ne konas, ĉar ĝi estas fiksita de F.U.B.E. mem. Sed, laŭ antaŭa sperto, ni povas diri, ke ĝi estos kulture agrabla (aŭ agrable kultura) kun kursoj, prelegoj, distraĵoj ktp. Ni memorigas ĉiujn pri tio, ke tiu periodo estas malfermita ne nur al la nevidantoj sed ankaŭ al la vidantoj. Pruviĝis, lastan someron, ke tia kunvivado riĉigas ĉiujn partoprenantojn. Dum periodo ankoraŭ belvetera, en meznombra grupo, kun programo riĉa sed ne tro densa, la staĝanoj de la lastaŭgusta F.U.B.E.-renkonto trovis grandan plezuron.

Se vi ne ŝatas la homamason de Julio venu en aŭgusto. La tria kaj la kvara periodoj ankoraŭ povas akcepti vin ; sed ne tro atendu.

Esperanto tra la Mondo

STUDENTA RONDO TUTMONDA :

Brazilano, S-ro Paulo R. dos Santos, Av. 7 de Setembro 170, Centro, BR-35500 Divinopolis, MG, Brazilo, proponas al la esperantistaj studentoj starigi Studentan Rondon Tutmondan por interŝanĝo de informoj kaj spertoj, kunesploroj, tradukadoj, verkado, renkontoj, k.t.p.

ESPERANTO EN INTERNACIA PROJEKTO « UNISPACE » :

Okaze de la Internacia Jaro de Junularo en 1985, la subkomisiono pri scienco kaj teĥniko de la neregistaraj UN-organizaĵoj iniciatis projekton « Unispace », en kiu rolu ankaŭ Esperanto. La projekto koncernus i. a. komputil-satelitan reton en ligado kun spac-navigado.

La iniciatintoj interesiĝas pri ĉiaj spertoj kaj provoj de programita instruado de Esperanto kaj uzado en komputiloj.

Por informoj oni povas skribi en Esperanto al D-ro Amri Wandel, Princeton University Obs., Peyton Hall, Princeton, NJ-08544, Usono.

PEDAGOGIA TEMO POR LA NACIA ITALA KONGRESO :

La itala Esperanto-kongreso okazonta de la 8-a ĝis la 15-a de septembro en San Pellegrino Terme (Bergamo) pritraktos la temon : « Esperanto, konkreta sperto al internacia edukado », kun pripedagogiaj prelegoj.

Aliĝo senpaga por alilandanoj. Informas : IEF, Via Villoresi 38, I-20143 Milano.

UNUAJ UNIVERSITATAJ KUNVENOJ EN SANMARINO :

De la 27-a de decembro ĝis la 7-a de januaro okazis la Unuaj Universitataj Kunvenoj en Sanmarino, kun partopreno de 100 esperantistaj sciencistoj kaj interesuloj. Okazis neoficiala fonda kunveno de la planita Akademio internacia de la Sciencoj de Sanmarino (AIS), prelegoj, kursoj, fondaj kunsidoj de la Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informatiko kaj Sistemiko (TAKIS).

UNUA VIDEOBENDO ?

Eldoniĝis videobendo en Esperanto kun 80-minuta prelego de Prof. H. Frank pri « La propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo ». Kopio haveblas, kontraŭ malplena videobendo (Instituto pri Kibernetiko, Forschungsstelle bei der Universität, Fachbereich 2, D-ro E. Jarmark, Warburgerstr. 100, D-4790 Paderborn, Germanujo).

INTERNACIA SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO :

Ĝi okazos en Veliko Tarnovo, Bulgarujo, de la 23-a ĝis la 29-a de julio. Popularaj prelegoj pri Esperantologio, interlingvistiko, arto, literaturo ; medicino, juro... Ekskursoj, amuzprogramoj, loĝado en studentaj hejmoj. Aliĝo antaŭ la 1-a de junio : Bulgara Esperanta-Asocio, Bul ; Botev 97, BG-1303 Sofia.

TURISMO, ESPERANTO, RENKONTOJ :

La 9-a Internacia Foiro de Esperanta-Turismo okazis de la 21-a ĝis la 30-a de oktobro. Partoprenis interalie Esperanto-turismaj servoj : Beneluksa Esperantotur, brita Esperantotur, Suno kaj Maro (Italujo), Pola Esperantotur, Matur Turizm (Turkujo), turismaj servoj el Rumanujo, Jugoslavujo, Hungarujo k.a.

Nova fenomeno aperas : vojaĝoficejoj komencas interesiĝi pri Esperanto, kiel helplingvo en la turismo (kun esperantaj gvidantoj).

— Estas bone indiki la eblecojn de turismo kun renkonto de esperantistoj en Turkujo, Irano, Pakistano, Hindujo, pere de la organizoj de Matur Turizm, esperantlingvaj servoj, Inonu Caddesi 15/1, Bursa, Turkujo.

— Amikeco-Renkonto en Santiago de Compostela (sen paroladoj), 15-21-an de julio.

Informas : Esperanto/P. Delaire, B.P. 2002, F-45010 Orléans, Francujo.

— La kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia okazos en la kolegio Easthampstead Park, je 50 km de Londono, 18/25-an de julio.

— Internacia konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en Ŝkofja Loka (Jugoslavujo), 13/21-an de aŭgusto. Inf. : Slovenia Esperanto-Ligo, Pf. 401, YU-61000 Ljubljana.

— Por la junuloj : franca-germana semajno, 12/19-an de aŭgusto, en Le Havre (Francujo).

Temo : « Malŝato inter la popoloj ». Aliĝoj : JEFO, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

— 7-a Internacia Semajno ĉe Mediteraneo en Sète, 9/16-an de septembro. Informas : Centre Culturel Esperanto, 5, rue du Dr Roux 34000 Montpellier.

— 1-a Internacia Kataluna Esperantista Ferisemajno, 1/8-an de julio, en Vilanova i la Geltru, ĉe Mediteraneo. Tre riĉa programo. Inf. : Seccio d'Esperanto del Centre d'Estudis, Biblioteca-Museu Balaguer, Sant Gervasi 45, Vilanova i la Geltru (Garraf) (Catalunya, Hispanujo).

KOMPUTOROJ KAJ ESPERANTO :

Projekto de komputoroj programeblaj kaj funkciigeblaj en Esperanto estas studata de firmao en Nederlando. La kunlaboro de diverslandaj fakuloj estas petata. Skribi al : Mondkomerca eldonejo esperantista, P.O. Kesto 25041, NL-3001 HA Rotterdam.

NOVAJ ASOCIOJ :

Asocio de Verduloj Esperantistoj (AVE), por la ekologoj aŭ anoj de la « verdaj » partioj. Inf. : C. Fettes, St-Columbia College, Dublin 16, Irlando.

— Asocio de Handikapitaj Esperantistoj (IAHE). Revuo : « Voĉo de handikapulo ». Adreso : Skolska 25, YU-56227 Borovo (Jugoslavujo).

ĈU VI POVUS INSTRUI ESPERANTON SOMERE EN « MUELEJOJ DE LA METILERNANTOJ » ?

S-ro Charles Chareille 23220 Bonnat, Francujo,respondeculo de la Asocio « Moulin des Apprentis » (Muelejoj de la Metilernantoj), serĉas volontulojn, kiuj povus partopreni la laborperiodojn de gejunuloj en julio kaj aŭgusto por instrui Esperanton al ili. Skribu rapide aŭ telefonu (55) 62 10 05.

POR HELPI LA MOVADON EN SRILANKO

Se vi povas subteni ĝermon de Esperanto-movado en Srilanko, sendu lernolibrojn (por aŭtodidaktoj kaj anglalingvanoj) kaj vortarojn al : Esperanto-grupo Srilanka, S-ro D.B. Jesudasan, « Poste restante », 71, Pagoda Para, Negegoda, Sri Lanka.

La Unuaj Enloĝantoj de Kanado

La plej malnova postsigno de homa ĉeesto en la Nova Mondo estis trovita en la provinco Jukon en Kanado : dudek sepmil-jara skrapilo. En tiu epoko vivis en norda Jukon ĉasistoj de mamutoj, rangiferoj kaj bizonoj. Ili verŝajne venis de Siberio tra la vastega ebenaĵo ekzistanta inter la nunaj Azio kaj Nordameriko, en la senglacia regiono nordjukona. Ili utiligis ŝtonajn ilojn, el kiuj kanelitajn lancopintojn. Kiam la lastaj glacitavoloj degelis, la ĉasistoj multobliĝis kaj okupis la pli grandan parton de la neglaciigita teritorio de Nordameriko. Elfosadoj montris, ke grandaj aroj de dikaj kaj maldikaj bestoj estis ĉasitaj sur la vastegaj tundro kaj tajgo ĝis 4 000 jaroj antaŭ Kristo.

Verŝajne, la unuaj loĝantoj de la marborda arktika kanada regiono estis la Inuit (Eskimoj). La plej malnovaj konataj Eskimoj vivis dum la tempaĝo de la tajlita siliko en nord-okcidenta Alasko, 2000 jarojn antaŭ Kristo. Ili ĉasis fokojn dum la somero sur la bordoj de la Bering maro ; aliaj vivis enlande kaj ĉasis la rangiferojn. La uzata ilaro el ŝtono aŭ osto estis prilaborita kun ega precizeco. La stilo mem tiom multe similas la paleolitikan kaj mezolitikan stilojn de Azio, ke oni povas pensi, ke de tie ĝi devenas. La pruvaĵoj verŝajne ekzistas en la grundo de la longa ebenaĵo, kiu kunligas Siberion kaj Alaskon, sed kiu malaperis antaŭ miloj da jaroj sub la akvo de la fandiĝintaj kontinentaj glacimontoj. Tiuj Eskimoj pluiris orienten al la nordo de Jukon, de Manitoba, de Kebeko, ĝis Groenlando, 2000 jarojn antaŭ Kristo. Dank'al la konstante frosta grundo de la Kanada Arktiko la vivo de la tiamaj Eskimoj estas bone konata. Ili vivis grupe sur vasta teritorio sub felo-tendoj dum la somero sed en duon-engrundigitaj kabanoj dum la vintro. Ili ĉasis fokojn kaj rosmarojn per harpunoj kun moveblaj pintoj, kaj rangiferojn per arko kaj sagoj. Ili ankaŭ fiŝkaptis harpune. Tiu epoko estis la tiel nomita pre-Dorseta.

Ok jarcentojn antaŭ Kristo floris la « Dorset-industrio », kiu produktis osto-pinglojn, specialajn harpun- kaj lanc-kapojn. La ŝtonaj iloj estis pli diversaj ol dum la Pre-Dorseta epoko. Oni fabrikis steatito-lampojn kaj ardezo-pintaĵojn verŝajne prenitajn de la Indianoj vivantaj pli sude. La Dorset-industrio vivis ĝis 900 post Kristo. Ĝin anstataŭis la Tule-industrio alportita de grupo de Alaska-Eskimoj, la Tulea popolo, kiu rapide migradis ĝis Groenlando kaj Labradoro. Tiuj Eskimoj ĉasis balenojn kaj fabrikis ilojn kaj objektojn el la ostoj kaj bartoj de tiu mambesto. La Tule-Eskimoj, prapatroj de la nunaj kanadaj Eskimoj, surportis tipajn fel-mantelojn, uzis kajakojn, umjakojn kaj tre kompletan fiŝkaptilaron. Ili konstruis igluojn tipe kanadajn, ĉar neniu tia glacikonstruo estas trovebla en Alaska.

Ĉar la grundo-nivelo progresive plialtiĝis en la Nordo, dum la akvo-nivelo malaltiĝis, la kanada Arktiko seniĝis je la dikaj balenoj ; la Tule-Eskimoj forlasis la konstantajn vintrajn vilaĝojn kaj fariĝis nomadaj.


En la okcidenta Kanado kulturo aperis jam antaŭ dekmil jaroj. La ĉasado de dikaj bestoj konsistigis la ĉefan vivrimedon de la Indianoj vivantaj en la Prerio, vasta herba teritorio. La teknikoj de tiuj Indianoj multe influis la nordajn popolojn kaj eĉ la sudajn ĝis la ebenaĵo de Brita Kolombio. Je la sama epoko vivis en Brita Kolombio unu aŭ pluraj indianaj gentoj, kiuj kaptis salmojn per ĵetsago kun foliformaj pintoj ĉe ĉiu ekstremo.

En la centra ebenaĵo la sagopintoj estis pedunkloformaj, similaj je tiuj de la tradicio de la orientaj teritorioj de Kanado kaj Usono. La orientaj popoloj verŝajne iris okcidenten, kiam la klimato pliboniĝis tie. La ĉefa nutro-fonto estis ĉasado de bizonoj, aliaj malpli grandaj bestoj kaj birdoj. Plukado estis alia fonto. Dum la unuaj jarcentoj de nia erao la Indianoj utiligis la « krutegaĵometodon » : la bizonoj estis pelitaj ĝis la supro de krutaj klifoj de kiu ili sin ĵetis malsupren por eskapi. Feliĉe la Indianoj laboris ankaŭ pace, ekzemple pri artoj, ĉefe pri ceramiko.

Ankaŭ en la Orienta Kanado homoj vivis antaŭ dekmil jaroj. Tiam grupoj de ĉasistoj trakuris la sudan landparton laŭlonge de la norda glaciejo. Ili reprezentis nur parteton de la homamaso, kiu venis de Azio. Jam 3500 jarojn antaŭ Kristo tiuj grupoj uzis ŝton-adzojn kaj ardezpintojn, ankaŭ multajn ilojn el polurita ŝtono kaj objektojn el osto. Ili sin nutris per ĉasaĵoj, fiŝoj kaj ankaŭ sovaĝaj plantoj. Pli sude la indiana kulturo evoluis al la « arbara stadio ». Aperis ceramiko kaj la tomboj riĉiĝis per ornamitaj iloj. Kvincent jarojn post Kristo la Irokezoj komencis kultivi maizon, kio multe modifis la vivon ĉiutagan de tiuj homoj : ili fariĝis fiksaj kaj multaj vilaĝoj aperis.

Iom post iom, en ĉiuj regionoj la homoj adaptiĝis al la natura medio. Facila evoluo por multaj el ili, sed multe pli malfacila por la Eskimoj, kiuj devis iom « eduki » malamikan naturon.

el « Canada d'Aujourd'hui ».



PRI NIAJ LITERATURAJ TREZOROJ

« La konstanta kreskado de nia literaturo iom post iom silentigos niajn malamikojn » skribis Zamenhof. Mi ne scias, ĉu li pravis, sed mi ne timas aserti, ke sen verkoj literaturaj jam de longe ne plu ekzistus nia lingvo. Tial, kiam la respondeculo (trovu mem, kiu li/ŝi estas !) de « Kulturaj Kajeroj » proponis al mi prizorgi regulan rubrikon, ne pri hodiaŭaj esp.-verkistoj, sed pri « malnovaj », mi ne rezistis pli ol kelkaj horoj, malgraŭ mia natura pigreco, antaŭ ol doni mian konsenton. Verdire, mi ne perdis tempon, gapstarante, dum tiuj kelkaj horoj : ĉar ŝancon havas mi esti direktoro (kun-!) de, se ne konkurenca, almenaŭ aliĝenra gazeto, mi ruze sukcesis akceptigi de pluraj el miaj eninentaj (kompreneneble) kunlaborantoj, ke ili, de tempo al tempo, anstataŭigu min por tiu rubriko. Tiel, mi jam povas anonci al vi, ke Jean-Pierre Danvy, aŭtoro de multnombraj noveloj, poemoj kaj artikoloj, sed ankaŭ tradukisto, i.a. de pli ol 50 kanzonoj, kaj Georgo Lagrange, « Tespa-provizanto » per tradukoj de Andromako, La Justuloj, La Kalva Kantistino, ktp, sed ankaŭ tradukisto de kanzonoj kaj aŭtoro de noveloj, poemoj, artikoloj kaj aperonta romano... verŝos sian prozon en tiun rubrikon — promeso estas promeso, ĉu ne ?

Kial skribi pri niaj « klasikuloj » ? Tutsimple, ĉar oni apenaŭ ilin konas aŭ nur supraĵe ; ĉar nur dank'al ili — kaj ne nur dank'al Zamenhof — ni povas ĝui hodiaŭ aŭtorojn, kiel Nemere, Auld, Lorjak, Piron, Ueyama Masao, K. Long, R. de Jong... aŭ Karolo Piĉ (!) ; ĉar fine, ni esperas, ke dank'al tiuj rubrikoj, ni povos instigi eldonistojn reeldoni niajn trezorojn, kaj tie mi pensas ne nur pri originalaĵoj, sed ankaŭ pri mondkonataj libroj, kiel « Tri homoj en boato », « Natan la saĝulo », k.m.a, kies traduko estas unuaranga.

Esperanto konis unikan ŝancon ; ne nur Zamenhof tuj de la komenco konsciis pri graveco de literaturo, sed tre rapide, ni diru en malpli ol 50 jaroj da ekzisto, dekoj da verkistoj kontribuis al starigo de vivanta lingvo. Per originalaĵoj aŭ tradukoj — kaj ambaŭ samvaloras male al asertoj de kelkaj, kiuj sendube neniam cerbumis pri la tradukoj, en la francan, de Edgar Poe far Charles Beaudelaire — tiuj homoj donis al ni ne forgesendajn radikojn : Kabe, Grabowski, Fez, Vallienne, Luyken, Baghy, Kalocsay, Schwartz, Privat, D.P. Boatman, Argus, J. Forge, S. Engholm, Varankin, Erošenko, Szilagyi, H. Dresen, E. Miħalski, A. Atanasov, Drezen, Lanti, Waringhien estas de ĉiuj (?) konataj, kvankam multaj iliaj libroj nur en bibliotekoj estas haveblaj, sed kiu konas G.-H. Backmann (La konscienco riproĉas, de Stindberg), G. Badash (Tri homoj en boato, La princo kaj Betty...), K. Minor (Natan...), Faulhaber (La papalagoj, Dekkinga fuĝas...), Louise Briggs (sonĝo de someromeza nokto), Berger (La vojo returne, de E.M. Remarque), ĉiuj brilaj tradukistoj ? Kvazaŭ neniu ! Ni konas la nomon de la komitatanoj de nia asocio... aŭ de la respondeculoj de iu Kultura Kastelo, kaj ni ne konas niajn verkistojn !

Ankaŭ mi ne konas, kaj certe neniam konos, ĉiujn niajn prozistojn, poetojn, novelistojn ; feliĉe cetere, kion mi legus, kiam mi emeritiĝos ? ! Tamen, mi scias, ke ili ekzistas kaj tio pli komfortigas min... Kelkajn librojn mi emas rekomendi al vi : « Vereco, distro, stilo » de William Auld (Arthur E. Iltis, 1981), « Nia originala prozo » de Heide Apolloner (Dansk Esperanto-Forlag, 1976) kaj kompreneble « Esperanto en Perspektivo » (U.E.A. 1974) kaj « Esperanto-katalogo » 84-85 de U.E.A. Dank'al tiuj libroj, vi povos enprofundiĝi en nian literaturon kaj samtempe eviti aĉeti ion ajn (krom por kolektantoj, kiuj povas tuj mendi, prefere al la libroservo de Grésillon, la verkaĵojn listigitajn en la 342 paĝoj de la katalogo de U.E.A).

Vi eble rimarkis, ke mi tute ne parolis pri niaj « malnovaj » verkistoj. Mi ja eĉ ne estis antaŭvidinta skribi tiun kvazaŭ-enkondukon al tiu nova rubriko, pro tro mallonga limtempo. Tamen mi esperas, ke mi sufiĉe klare prezentis, kion mi celas tra tiu rubriko. Mi provos konigi, kion mi konas kaj antaŭ ĉio ŝatigi, kion mi ŝatas.

Ĵak LE PUIL.

Kastelo Grésillon

Kulturdomo en bela Franclando,
Kie vivas lingvo Esperanto ;
En Grésillon, en granda kastelo
Unuigas gastojn verda stelo.

Ĝi fariĝis la Esperantio,
Kie regas paca harmonio ;
Ĉiutage en la tuta jaro
Renkontej' de l'esperantistaro.

Vin atendas distriĝ' kaj laboro,
Lerno, kanto, ĝoj' en ĉiu horo ;
La infanoj povas gaje ludi,
La fakuloj pri la lingv' diskuti.

La semajnoj flugas kiel vento,
Sed ne flugas for la nova sento ;
Belaj tagoj vivos en memoro,
Al reven' sopiras ĉies koro !

Istvan Nagy.

El la Programo de la "Kultura Periodo" en 1984

Laŭ invito de la Konsilantaro ... s-ano Hugo Röllinger,
Bad Kissingen (F.R.G.), ...
ankaŭ ĉi-somere prezentos serion da diapozitivaj prelegoj, inter ili kvar novajn, ellaboritajn por « Grésillon ».
Pri titoloj kaj enhavoj ni sciiĝis de s-ano Röllinger jenajn detalojn ...

1) **LA FAŬNO DE L'PRATEMPO**
De flageluloj al gigantaj saŭroj (110 diapozitivoj).

Multajn centmilionojn da jaroj antaŭ la komenco de la homa historio komenciĝis la historio de la plantoj kaj bestoj sur nia planedo.

La paleontologio montras, kiel estiĝis la nuntempa faŭno kaj kiel aspektis ĝiaj praaj antaŭuloj.

Multaj homoj trovas fascinigaj la pensojn pri la multspecaj, ofte bizaraj estaĵoj, kiuj iam antaŭ eonoj evoluiĝis en la pra-maro, el kiuj specioj poste konkeris la firman teron kaj inter kiuj, ree poste, kelkaj eĉ kapablis flugi, kvankam ne estante birdoj ...

En tiun foran pasintecon gvidas jena prelego, ne montronta simple fosiliojn aŭ skeletojn, sed la evoluon de l'vivo dekomence, en kronologia sinsekvo, pere de bilde « vivoplenaj » estaĵoj, science pravigitaj, en iliaj naturaj medioj.

2) **TUT - ANĤ - AMUN : LA EGIPTA TREZORO EL EBURO KAJ ORO.**

Ĝis la hodiaŭa tago neniom perdis la tombejo de l'egipta faraono « Tut » de sia fascino, depost ties malkovro en 1922 — tute male.

Krom la portreto-similaj mumiaj sarkofagoj, inter kiuj unu konsistas el 110 kg da pura oro Howard Carter trovis ĉ. 5 500 tombajn aldonaĵojn, kiel statuetojn, meblojn, ornamaĵojn de netaksebla materia, arta kaj historia valoroj — atestaĵoj pri kulturo de tuta epoko.

La pompo de la trovitaĵoj ravis — kaj ankoraŭ ravas la mondon.

La prelegonto, kiu vizitis la trezorojn en la Egipta Muzeo en Kairo kaj plue, poste, dum la monda turneo, selekton el ili en Berlino kaj Munkeno, prezentos pri la trezoro ĉ. 80 diapozitivojn kiel imprese perfektajn kolorfotografiajn reproduktojn.



3) **PAPILIOJ — FLUGANTAJ JUVELOJ**
150 ekzotaj specioj el kvin kontinentoj en vivantecaj koloroj.

Eĉ ne floroj plej pompaj, orkideoj ekz., en formoj kaj koloroj povas vesti sin tiel rave kiel la ĉarmaj baletistinoj de l'naturo, la papilioj. Estos probable frandaĵo de aparta ĝuo por la okuloj, aŭdvidi kvazaŭ laŭ vivantaj estaĵoj, flugil-etendaj ĝis 25 cm, pri naskiĝo kaj estado de tiuj kreaĵoj delikataj, infanoj de l'suno, kreaĵoj de l'lumo.

4) La aktuala arkeologia sensacio :
LA UNUA IMPERIESTRO DE ĈINIO
Mistera rajdista armeo 2 000-jara.

Ĉin-Ŝi-Huang-Ti, la unua imperiestro de ĉinio, vivinta antaŭ 2 200 jaroj, konstruigis la Grandan Muron kaj metis la fundamenton al regno, kiu daŭris pli ol 2 000 jaroj.

Plua verko de tiu-ĉi reginto enigma kondukis al la plej granda arkeologia sensacio de la pasintaj 50 jaroj : malkovro de lia giganta subtera maŭzoleo, 47 m alta, kun ĉ. 7 000 terakotaj armitaj soldatoj, ĉevaloj antaŭ batalveturiloj k.s., ĉio en natura grando, sub teritorio 230 m longa kaj 62 m larĝa.

Omaĝe al la Veneciano Marko Polo, depost 6 jarcentoj historie ŝatata speciale en Ĉinio, en Venecio okazis laŭ iniciato de la ĉina registaro en 1983 unika ekspozicio pri jena evento. (85 diapozitivoj).

5) **MAROKO — LA ORIENTO ANTAŬ la SOJLO DE L'OKCIDENTO**

En aktualigita formo prezentiĝos bilde kaj parole la enigma, pitoreska Maroko. Meknes, Fes, Rabat kaj Marakeŝ — jen la kvar klasikaj reĝaj urboj de la lando, karakterizita per rokaj pejzaĝoj, neĝo-kovritaj montaroj, fruktabundaj valoj kaj la « kasba », la ruĝaj, krenelaj familiaj kasteloj, kaj per ĝiaj pitoreskaj bazaroj kun sorĉo-artistoj kaj serpentistoj... Originala surbenda muziko akompanos 150 kolordiapozitivojn.



PAGÔ DE LA GEKNABOJ



"Malglataj maroj", indiĝena pentristo de Aùstralio

Aŭstraliaj indiĝenoj estas konataj pentristoj. Indiĝeno pentras sur rokoj aŭ sur arboŝelo deprenita de la arbo. Sur Insulo Mornington (Monintn), kiu situas en la Golfo de Carpentaria (Kapnterija) norde de Kvinslando, loĝas pentristo Goobalathaldin. Goobalathaldin signifas en la indiĝena lingvo : malglataj maroj (angle : rough seas), pro kio li nomas sin Dick Roughsey (Dik Rafsi). Kiel Dick Roughsey li verkas belajn librojn pri popollegendoj de sia raso.

Li ankaŭ lernis pentri, je la stilo de eŭropanoj, oleopentraĵojn kaj akvarelojn. Li pentras bildojn por la libroj, kaj ofte li eksponas pentraĵojn en la granda urbo Sidnejo.

La ĉiapuda bildo prezentas rakonton pri kaptado de dugongo kaj pri dancado kaj pri mortigo de indiĝeno. Tiu rakonto estas parto de popol-legendo pri la nigra raso aŭstralia.

Onklino Ĝina, Toowoomba, Aŭstralio.



La ĉevalo kaj la lupo
(Kie estas la lupo?)


Al ĉiuj plaĉas enigmoj, ĉu ne ?

Jen du enigmoj,
kiujn sendis
por vi sinjorino
Marie-Thérèse
Lloancy, Francio.

Kiom da tempo
vi bezonos
por
trovi la solvojn ?



La rano kaj la bovo ...
(Kie estas la bovo?)



MEDITERANEA

MALTO

Sola meze de la maro, la malta arkipelago estas la kvintesenco de Mediteraneo. Historie ĝi okupas pozicion tute misproporcian al sia amplekso. La kialo por ĉi tio estas la fakto, ke la insularo estas kvazaŭ egaldistanca de Gibraltaro je unu flanko, kaj de Kipro je la alia ; kaj ankaŭ la fakto, ke ĝi regas la ĉefajn komercvojojn inter Nordafriko, Sicilio kaj Italio.

Se vi rigardas iun ajn mapon, vi rimarkas, ke ĝuste sub Sicilio troviĝas punkto. Tiu punkto estas Malto, lavata de la mediteranea maro, kiu troviĝas ĝuste meze de la kontinentoj, sekve ĝia nomo signifas « Meze de la tero ».


La malta arkipelago konsistanta el Malto, Gozo, Kemmuna, Kemmunett, kaj Filfla estas la supro de monto iam subakviĝinta ĉirkaŭ 120 metrojn sub la marnivelo. La tuta insulara areo estas 315 kvadrataj km. Malto, la plej granda, estas ĉirkaŭ 27 kilometrojn longa kaj 14 km. en la plej larĝa parto ; ĝia areo estas 246 kvadrataj km. La areo de Gozo estas 67 kv. m ; ĝi estas 14 km longa kaj 7 km larĝa. Je distanco, Malto estas 93 km sude de Sicilio kaj 290 km for de Nordafriko. Krome, Gibraltaro situas 1836 km okcidente dum Aleksandrio 1519 km oriente.

La unuan fojon, oni renkontas la nomon Malto sur la romiaj moneroj, kiuj surhavis punikan skribaĵon. Iuj deĉifris la vorton kiel AMUN, signifantan ŜIPON, dum aliaj legis ĝin AJNUN, signifantan FIŜON. Verdire, Malto similas al fiŝo aŭ havas ŝipformon. Krome, sur amforo trovita en Vulci, Italio, fabrikita en ĉ. 500 a.K., oni trovis la nomon MELITE aŭ MELITAIE, nomon trovitan ankaŭ ĉe grekaj aŭtoroj. Sed estas certe, ke la Fenicoj nomis Malton foje MALITAH, foje MALTA.

Ĉi tie oni devas emfazi la bazon de la malta historio : la Maltanoj estas Eŭropanoj, kristanoj kaj parolas semidan lingvon, latinlitere skribitan.

PRAHISTORIO

Nepraĵo kiel komprenigilo al la aŭroro de la insula historio estas kaverno situanta apud la marbordo sude de la insulo. Ĝia nomo estas GHAR DALAM (pr. Ar Dalam) Malluma Kaverno. La natura kaverno estis tunelita el la pli profunda korala kalkŝtono per la akvoago, kiu trafluis fendon dum la pliocen-periodo (antaŭ ĉ. 11 milionoj da jaroj). Krom stalaktitoj kaj stalagmitoj, en la kaverno troviĝis sennombraj bestostoj en fosilia stato. Ĉi tiuj fosiliaj ostoj elmontriĝas nun en la apuda muzeo, kie videbliĝas ankaŭ la tiel nomita *Elaphus Antiquus Melitensis :* la malta nana praelefanto, unu metron alta. Ĉi tiuj bestoj almigris suden de la nordaj landoj, kiam Malto estis ankoraŭ roke ligita al Eŭropo. Tiuj bestoj alvenis suden pro la neebleco pluvivi en la glacikovrita Eŭropo norda kaj centra.



La Hipogeo : La Plejsanktejo, elhakita en la subtera roko.

LA UNUAJ ENLOĜANTOJ

La malta insularo fieras pri siaj prahistoriaj monumentoj same kiel Egiptujo pri siaj piramidoj, kiel Anglujo sin gloras pri siaj Avesbury kaj Stonehenge. Dise tra la malta insularo troviĝas ĉirkaŭ 30 el tiuj unikaj megalitaj pratemploj. La plej admirindaj estas tiuj de GGANTIJA (pr. Ĝgantija) en la apuda insulo Gozo kaj la triopo HAGAR QIN (pr. Haĝar Kim), Mnajdra kaj TARXIEN (pr. Tarŝin) en Malto. Ili ĉiuj estas preskaŭ samtipaj kvankam konstruitaj en diversaj periodoj. Laŭ arĥeologiaj restaĵoj, la unuaj homoj enloĝantaj Malton alvenis ĉirkaŭ 5000 a. K. La datoj de la kultura sinsekvo de la malta prahistorio laŭ la famekonata arĥeologo Kolin Renfrew estas la jena : la neolita : 5000-4400 a.K. ; la ĉalkolita (kupra) : 4100-2500 a.K. ; la bronza : 2500-750 a.K.

La plej frua civilizacio en Malto estis nomata « neolita », alveninta en Sicilio. En Malto ĝi estas konata kiel la kulturo de *Ghar Dalam*, jam aludita. Ĝi estas la plej antikva elmontrejo de la insulo, tombejo de miloj da nanaj hipopotamoj kaj elefantoj, kies ankoraŭ restantaj skeletoj priokupas la paleontologojn.

La *ĉalkolita epoko* prezentas la preparan periodon de tiuj unikaj megalitaj temploj (megalitaj = konstruitaj per grandegaj ŝtonblokoj).

La orienta Mediteraneo donis al Malto la neolitan kulturon ; la okcidenta Mediteraneo donis al ĝi la ĉalkolitan kulturon. De ĉi tiu epoko datiĝas la pratemploj, al kiuj nenio simila estis iam trovita, kie ekzistas la megalita arĥitekturo.



Unu el la megalitaj pratemploj (ĉi tie de Tarsin).

Estas interese aldoni, ke ekzistas alia specialaĵo arĥitektura : la HIPOGEO, subtera templo, kiu enhavas plurajn detalojn similajn al tiuj en la aliaj subĉielaj temploj. Sed ĉi tiu « hipogeo » estas rimarkinda pro la fakto, ke ĝi estas hakita tute en la roko. Komuna trajto por ĉiuj temploj estas la TRIŜTONARO, konstruita el grandega ŝtonplato kuŝanta sur du starantaj, kaj havanta la formon TT.

Nedubeble, Malto estas trezorejo de la praarĥitekturo. Plie : Profesoro Temi Zamnit, malta arkeologo, admiris Malton kiel « la sanktan insulon de la prahistorio ». Kaj la jam menciita Renfrew informas per tre pensigaj vortoj : « La temploj de Malto pretendas esti la plej imponaj historiaj monumentoj de la mondo... Laŭ la radio-karba kronologio, ili estas la plej fruaj solaj ŝtonmonumentoj de la mondo ».

LA FENICOJ KAJ LA KARTAGANOJ

La Fenicoj, komercante laŭlonge de la Nordafrika marbordo transe al Sicilio, komencis ekde la jaro 800 a.K. uzi Malton kiel havenon kaj rifuĝejon kontraŭ la mediteraneaj ŝtormoj. La postaj regantoj estis la Kartaganoj, kiuj estis samgentanoj kun la Fenicoj, sed eniris Malton je la lasta parto de la 8-a jarcento. a.K.

ROMO KAJ SANKTA PAŬLO

En 218 a.K., t.e. dum la dua punika milito, la romia konsulo Titus Sempronius kaptis al Romo Malton. Ĉi tiu nova por Malto estro starigis lokajn industriojn por komerco eksporta.

En 60 p.K., S-ta Paŭlo suferis ŝippereon en Malto. La rakonton de ĉi tiu glora epizodo oni povas legi el la « Agoj de la apostoloj » je ĉapitroj 27 kaj 28. En ĉi tiu rakonto, la plej okulfrapaj vortoj de S-ta Luko, la verkisto de la « Agoj » kaj akompananto de S-ta Paŭlo, estas la jenaj : « Kaj kiam ni saviĝis, tiam ni eksciis, ke la insulo estis nomata Melita. Kaj la barbaroj (por la Romianoj, « barbaro » signifis tiun, kiu ne estis Romiano) montris al ni neordinaran bonecon... Ĉi tiuj ankaŭ honoris nin per multaj honoroj ; kaj kiam ni ekreveturis, ili surŝipigis ĉion, kion ni bezonis ». Tio montras la maltan gastamecon, ankoraŭ faman ĝis hodiaŭ. En 870 p.K., t.e. post 100 jaroj da bizanca regado, la sicilia emiro venkis Malton.

Karmel MALLIA
(daŭrigota)

LA LUMTURO DE L' SANGO (1)

Ĉi nokte mi ne povis dormi. La mistralo koleris kaj la sonoj de ĝia potenco forprenis mian dormemon ĝismatene. Mallerte balancante siajn vunditajn alojn, kiuj siblis pro vento same kiel la velaro de ŝipo, la tuta muelejo krakadis. Tegoloj forflugis de ĝia konfuza tegmento. Malproksime, la kunpremitaj pinoj, kiuj kovras la monteton, agitiĝis kaj bruis en la ombro. Oni povus opinii sin surmare.

Tio plene memorigis al mi miajn belajn maldormojn antaŭ tri jaroj, kiam mi loĝis en la Lumturo de l'Sango, fore sur la korsika bordo, ĉe l'enirejo de l'Golfo de Ajaccio (Ajako).

Plia bela anguleto, kiun mi malkovris, por revi kaj esti sola.

Imagu duberuĝan insulon kun sovaĝa aspekto ; la lumturo ĉe unu ekstremo, ĉe la alia, malnova ĝenova turo, kie, je mia epoko, aglo loĝadis. Malsupre, ĉe l'bordo de l'akvo, ruiniĝinta lazareto, ĉiuflanke invadita de herboj ; kune, ravinoj, makisoj, altaj rokoj, kelkaj sovaĝaj kaprinoj, etaj korsikaj ĉevaloj diskurantaj kun sia hararo en la vento ; fine, supre, tutsupre, meze de kirlego de marbirdoj, la domo de l'lumturo kun sia platformo masonita kaj blanka, kie la gardistoj preskaŭ senĉese promenadis, la verda ogivforma pordo, la gisa tureto kaj supre, la granda, multfaceta lanterno, kiu flambrilas subsune kaj eĉ dumtage... Jen la insulo de l'Sango, tia, kian mi ĝin revidis ĉi nokte, aŭskultante la ronkadon de miaj pinoj. Al tiu ensorĉita insulo, antaŭ ol posedi muelejon, mi kelkfoje enfermis min, kiam mi bezonis puran aeron kaj solecon.

Kion mi faris ?

Tion, kion mi faras ĉi tie, eble malpli. Kiam la mistralo aŭ la transmonta vento ne blovis tro malmilde, mi kutimis sidi inter du rokoj samnivele kun la akvo, meze de la laroj, merloj, hirundoj, kaj tie, mi restadis preskaŭ la tutan tagon, en tiu kvazaŭa stuporo kaj delica laceco, kiun havigas la kontemplado de l'maro. Vi verŝajne konas tiun agrablan ebriiĝon de l'animo. Oni ne plu pensas, ankaŭ ne revas ; via tuta konscienco forflugas kaj diseriĝas. Oni similas la mevon, kiu subakviĝas, la ŝaŭmopolvon, kiu ŝvebas subsune, inter du ondoj, la blankan fumon de tiu foriĝanta ŝipo, tiu ruĝvelan koralboaton, tiun akvoperlon, tiun eron da nebuleto, ĉion escepte la propra memo...

Ho ! Kiom da belaj horoj mi pasigis sur mia insulo, da duondormado kaj dismemiĝo...

La tagojn, kiam granda vento blovis, la akvobordo estis nevizitebla ; tiam, mi enfermis min en la korto de l'lazareto, eta korto melankolia, odoranta je rosmareno kaj sovaĝa absinto kaj tie, dum mi kaŭris kontraŭ malnova murfaco, milde invadis min nepreciza parfumo de izoleco kaj malgajeco, kiu ŝvebis kun la suno en la ŝtonaj truoj, ĉirkaŭe malfermitaj kiel antikvaj tomboj. De temp' al tempo, bruo de pordo malpeza, salto en la herbo... kaprino venis sin paŝti, ŝirmata kontraŭ la vento. Ekvidante min, ŝi senmoviĝis timoplena, kaj daŭre staris antaŭ mi, kun vigla aspekto, alta korno kaj kontemplante min infanmaniere...

Ĉirkaŭ la kvina, la voĉfunelo de la gardistoj vokis min por la vespermanĝo. Mi ekuzis tiam etan vojeton en la suprengrimpanta makiso apike super la maro kaj nerapide revenis al la lumturo, ĉiupaŝe rigardante al tiu senlima horizonto de akvo kaj lumo, kiu ŝajne plilarĝiĝis laŭmezure kiel oni grimpis.

Supre, estis ĉarme. Mi ankoraŭ memoras tiun belan manĝoĉambron kun larĝaj slaboj kaj kverka plafono, la bujabeson fumantan en la mezo, la pordon larĝe malfermitan al la blanka teraso kaj la tutan okcidenton, kiu envenis. La gardistoj estis tie kaj atendadis min por altabliĝi. Ili estis tri, unu Marsejlano kaj du Korsikanoj, ĉiuj nealtaj, barbaj, kun sunbruligitaj faj fenditaj vizaĝoj, kun la sama vesto el kaprinhararo, sed tute malaj pri manieroj kaj humoroj.

Laŭ la vivmaniero de tiuj viroj, oni tuj sentis la diferencon de tiuj du rasoj. La Marsejlano ĉiam laborema, vigla kaj senĉese okupita, ĉiam senripoze trakuranta la insulon kaj la tutan tagon por ĝardeni, fiŝkapti, kolekti birdovojn, kaŝiĝanta en la makiso por melki kaprinon survoje kaj ĉiam kun iu ajloleaĵo kaj bujabeso en preparado.

Rilate la Korsikanojn, ekster ilia deĵortempo, ili zorgis pri nenio ; ili kondutis kiel ŝtatoficistoj kaj pasigis sian tutan tempon en la kuirejo, okupitaj de senfinaj ludoj de « scopa » (skopa), kiujn ili interrompis nur por rebruligi siajn pipojn, severmiene, kaj por dispecigi en siaj manoj kaj per tondiloj grandajn foliojn de nenatura tabako.

Aliparte, Marsejlano kaj Korsikanoj konsistigis triopon da homoj senafektaj, naivaj kaj tute komplezemaj por sia gasto, kvankam supozeble, ili juĝis lin tre stranga sinjoro.

Imagu ! Enfermiĝi en lumturo nur pro plezuro !... Ili ja trovas la tagojn tre longaj kaj estas plej feliĉaj, kiam ilia vico venas por iri sur la kontinenton. En la bela sezono, tiu ega feliĉo okazas ĉiumonate. Dek tagojn surtere post tridek ĉe la lumturo, jen la regularo, sed dumvintre kaj okaze de malbona vetero, la regularo ne plu validas. La vento blovas, la ondo leviĝas, la Sanginsulo estas blanka pro ŝaŭmo kaj la deĵorantaj gardistoj restas enfermitaj du aŭ tri monatojn sinsekve, iafoje eĉ en teruraj situacioj.

— Jen tio, kio okazis al mi, sinjoro, iam rakontis la maljuna Bartoli dum nia vespermanĝo — jen tio, kio okazis al mi antaŭ kvin jaroj, ĉe tiu sama tablo, ĉe kiu ni sidas, iun vintran vesperon, kiel nun. Tiun vesperon, ni nombris nur du en la lumturo, mi kaj kamarado nomita Ĉeko. La aliaj troviĝis sur la kontinento, malsanaj, aŭ

feriantaj, mi ne memoras. Ni finis nian manĝon tute kviete. Subite mia kamarado ĉesigas la manĝadon, min rigardas momenton per strangaj okuloj kaj puf ! falas sur la tablon, kun brakoj antaŭe. Mi rapidas al li, lin skuas, vokas :

— Ĉeko !... Ho ! Ĉeko !...

Senresponde. Li ĵus mortis. Imagu kian emocion. Pli ol unu horon, mi restadis tie, stuporfrapita kaj tremanta antaŭ tiu kadavro. Kaj subite ekvenas tiu ideo « la lumturo ! ». Mi rapidis al la lanterno kaj ĝin lumigis. Jam malhelis... Kia nokto, sinjoro ! Nek maro nek vento havis siajn kutimajn voĉojn. Ĉiumomente, ŝajnis, ke iu vokas min en la ŝtuparo. Krome, febron kaj soifon ! Sed nenio povis instigi min malsupren... Mi tro timis la mortinton. Tamen, ĉe l'ektagiĝo, kuraĝo revenis en min. Mi portis mian kamaradon sur lian liton ; tukon super lin, eron da preĝo kaj rapide al la alarmsignaloj.

Bedaŭrinde, la maro restis tro danĝera ; malgraŭ ripetitaj alvokoj, neniu venis. Nur mi en la lumturo kun la kompatinda Ĉeko kaj nur Dio scias ĝis kiam. Mi esperis konservi lin apud mi ĝis la alveno de l'boato, sed post tri tagoj ne plu eblis... Kion fari ? Lin porti eksteren aŭ enterigi ? La roko estis tro malmola kaj tiom da korvoj vivas sur la insulo. Kia malfeliĉo fordoni tiun kristanon al ili. Tiam mi ekpensis lin malsuprenporti en unu el la ĉeloj de l'lazareto... Tiu malĝoja laboro postulis la tutan posttagmezon kaj mi certigas al vi, ke mi bezonis grandan kuraĝon. Nu ! Sinjoro, ankoraŭ nun, kiam mi troviĝas sur tiu flanko de l'insulo, dum ventega posttagmezo, ŝajnas, ke mi daŭre portas la mortinton sur miaj ŝultroj.

Maljuna kompatinda Bartoli ! Ŝvito aperis ĉe lia frunto, kiam li nur elvokis tiun eventon.

Niaj manĝoj okazis tiel, kun longaj babiladoj ; maro, lumturo, rakontoj pri ŝiprompiĝoj aŭ pri korsikaj banditoj... Poste, ĉe l'noktiĝo, la gardisto de l'unua vaĉo lumigis la lampeton, prenis sian pipon, la felbotelon, dikan libron « Plutarque » (2) kun ruĝaj tranĉaĵoj, kiu konsistigis la tutan bibliotekon de la turo de l'Sango kaj malaperis tra la fono. Post momento, okazis en la tuta turo bruego de ĉenoj, pulioj kaj horloĝpezaĵoj, kiujn oni streĉis...

Dume, mi eliris kaj sidiĝis sur la teraso. La suno, jam tre malalta, pli kaj pli rapide kuris al la akvo, kunpreninte la tutan horizonton. La vento malvarmetis, la insulo iĝis violkolora. En la ĉielo, apud mi, dika birdo peze flugis ; estis la aglo de la ĝenova turo, kiu revenis. Iom post iom, la marnebuleto supreniris. Baldaŭ estis videbla nur la blanka orlo de l'ŝaŭmo ĉirkaŭ la insulo. Neatendite, super mia kapo, ŝprucis granda torento de milda lumo. La lumturo lumis. Lasante la tutan insulon en ombro, la hela lumradio atingis tre malproksimen sur la maro, kaj mi estis tie kvazaŭ perdita en la nokto sub tiuj grandaj lumondoj, kiuj apenaŭ tuŝis min dum sia vojo. Sed la vento iĝis ankoraŭ pli malvarma. Necesis reiri internen. Palpe, mi fermis la dikan pordon, mi fiksis la ferstangojn kaj ĉiam kvazaŭblinde, mi ekuzis etan ŝtuparon el giso, kiu tremis kaj sonis sub miaj piedoj, kaj mi atingis la suprajon de l'lumturo. Tie, fine, lumo regis !...

Imagu Carsel (Karsel) lampon gigantan kun ses vicoj da meĉoj ĉirkaŭ kiuj nerapide turniĝas la parioj de la lanterno, kelkaj fermitaj per grandega lenso kristala, aliaj malfermitaj antaŭ granda nemovebla vitrajo por ŝirmi la flamon kontraŭ vento. Enirante mi preskaŭ blindiĝis. Tiuj kuprajoj, tiuj stanajoj, tiuj reflektiloj el blanka metalo, tiuj muroj el konveksa kristalo, kiuj turniĝis kaj formis grandajn bluaĉajn cirklojn, tiuj giganta movbrilo kaj lumludoj turnigis mian kapon.

Tamen, iom post iom, miaj okuloj alkutimiĝis kaj mi eksidis ĉe la piedo mem de la lampo ; apud la gardisto, kiu legis sian Plutark-libron laŭte pro timo de l'ekdormo.

Ekstere, nur mallume kaj abisme. Sur la balkoneto ĉirkaŭ la vitrajo, la vento kuras kiel frenezulo kaj hurlas. La turo aŭdigas kraketojn, la maro bruas. Ĉe l'ekstremo de l'insulo, sur la subrifoj, la ondoj pensigas pri kanonpafoj. Iafoje, nevidebla fingro frapas la vitrajon ; iu noktobirdo altirita de l'lumo, frakasas sian kapon sur la kristalo. En la brilega kaj varma lanterno nur la kraketado de la flamo, la bruo de l'oleo, kiu falas pogute de la ĉeno, kiu malbobeniĝas ; kaj unutona voĉo psalmeleganta la vivon de Demetrio de Phalère (Faler) (3).

Noktomeze : la gardisto ekstaris, lastfoje kontrolis siajn meĉojn kaj ni malsupreniris. En la ŝtuparo, oni renkontis la kamaradon de la dua vaĉo, kiu grimpis, frotante siajn okulojn. Oni donis al li la felbotelon kaj la Plutarkon. Poste, antaŭ ol enlitiĝi, ni eniris iom en la ĉambron malproksiman, plenplenan je ĉenoj, dikaj peziloj, stanaj ujoj, ŝnuregoj, kaj tie, dank'al la lumeto de sia lampo, la gardisto skribis sur la granda registro de l'lumturo : Noktomeze. Malkvieta maro. Ŝtormo. Ŝipo malproksime.

KLARIGAJ NOTOJ

(1) SANGUINAIRES : la ĝusta traduko por tiu vorto estas « sangavida, sangama », sed por malpezigi la titolon, mi preferis uzi la esprimon « lumturo de l'Sango », tiel nomita verŝajne pro la multnombraj ŝiprompiĝoj en la ĉirkaŭaĵo.

(2) PLUTARQUE : greka historiisto naskiĝinta ĉ. 50 p.K.

(3) DEMETRIO DE PHALERE : greka oratoro, ŝtatisto, kiu vivis en la mezo de la 2-a jarcento p.K.

Alphonse DAUDET (Alfons Dode)
trad. André RIBOT

POR VIA DISTRO

Teksitaj vortoj :

En la kradoj aperintaj en la antaŭa numero enŝoviĝis preseraroj, kiuj igis la problemon preskaŭ nesolvebla. Ni petas pardonon pro tiuj fuŝaĵoj.

La trovota frazo estis : a) « Ni devas tion ĉi fari ne facilanime sed nur en okazoj de efektiva neceseco ; b) fari tion ĉi post matura prijuĝado povas ne apartaj personoj sed nur centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro ».


« Pri eventuala « perfektigado de la lingvo ». Fundamento de Esperanto eldono EFE p. 48 ».

Solvo de la krucvortoj :

proponitaj en numero 1983 - 6.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	S	E	P	T	E	M	B	R	A
2	E	K	R	A	N	O	■	E	L
3	M	I	A	Ŭ	I	■	A	M	O
4	A	P	O	G	R	E	L	O	j
5	J	■	N	A	I	V	U	L	O
6	N	E	K	■	S	I	D	A	■
7	O	B	L	O	■	T	E	D	A
8	F	L	I	R	T	E	■	O	J
9	I	■	N	O	R	M	O	■	L
10	N	J	O	■	E	A	S	T	O

NOVA ENIGMO



GRAMATIKO PER BONHUMORO

ANTO - INTO - ONTO

TIUJ VERBAJ SUFIKSOJ montras personon :

— **Kiu -hodiaŭ — agas** (anta -as)
la leganto laŭtvoĉe legas

— **Kiu -hieraŭ — agis** (into -is)
la kongresintoj estis multaj

— **Kiu -morgaŭ — agos** (onto -os)
la vojaĝonto frumatene foriros.

RIM : ja, oni povas apudmeti diverstempajn agojn :

— la leganto morgaŭ aĉetos samaŭtoran libron.

— la ekskursintoj, lacaj, hodiaŭ ripozas.

— la voĵaĝonto hieraŭ fruvespere endormiĝis.


La verbaj finaĵoj precizigas la momenton de ĉiu ago.

Prave dirite :




Ha ! pri tiun veturilon ! Kaj grumblinto, kaj grumblanto, kaj grumblonto ! Sufiĉas ! Cetere, estu logika : ĉar estas bufroj ĉe la veturiloj, la aŭtadintoj rajtas ĝin uzi. Kaj rimarku, nur la frontbofro estas difektita ; povis okazi, ke ankaŭ la postbofro...

Mirego :



Kio okazis al tiu piedirontoj ? Mi apenaŭ tuŝis la trotuaron ; ĉu vi rimarkos, kiel lerte ili saltis. Bone estas, ke la freneziga trafiko trudu al ili ĉiutagan trejnadon.


Okulon pro okulo, dento pro dento :



Rapidu, sinjoro policano ; nia Prof' lasis ĝian veturilon sub la panelo « malpermesite » ; li meritas punon ; ĉar ni, li nomas senpripensaj lernantoj punendaj.

KOREKTOJ :

— tiu veturilo, aŭtadantoj, ilin.
— tiuj, piedirantoj, rimarkis.
— denton, sian, nin.



Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brŭcke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e - D ALICANTE - (1 100 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (12240 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (24 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).

Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (55 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al : ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 2 de 1984, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

L'Assemblée Générale du 15 avril 1984 a permis aux membres présents de recevoir les explications qu'ils désiraient sur la gestion de la M.C.E. Nous pouvons remercier les membres, malheureusement insuffisamment nombreux, qui ont pu venir à Grésillon. Le nombre de procurations était un peu plus élevé que l'an dernier ainsi que le capital représenté. Le problème des sociétaires dont les convocations nous reviennent depuis plusieurs années et de ceux qui sont décédés mais dont les héritiers ne se manifestent pas s'est encore posé. Peut être certains pensent-ils : « Ils n'ont qu'à garder la somme ! ». C'est possible, mais à condition que nous soit retourné le certificat ou que nous soit adressée une demande écrite de remboursement des parts ou de leur transformation en don. Je fais donc appel au nom du Conseil d'Administration, à tous ceux qui peuvent nous donner la nouvelle adresse des membres qui en ont changé ou des renseignements sur les héritiers des membres décédés. La liste en paraît dans ce numéro. Vous nous rendrez un grand service. Merci.

Autre question discutée, celle de la Fonduso Belbona Espero. Le capital n'appartenant pas à la M.C.E., l'Assemblée Générale n'avait pas à discuter de sa gestion. L'attribution des séjours gratuits n'a pas posé de problème sur le plan de la sélection des candidatures, celles-ci ayant été fort peu nombreuses. Si cette année encore, malgré nos appels répétés, il en est de même, nous pourrons aussi proposer une aide pour les frais de voyage. Le bénéfice de ces aides ne peut être attribué qu'à de jeunes étrangers. Si parmi vos correspondants il y a des jeunes qui aimeraient venir à Grésillon et en ont fait connaître le désir, transmettez-leur l'offre qui leur est faite. Même si aucun désir n'a été exprimé, faites connaître la Fonduson Belbona Espero chez vos correspondants étrangers.

A la réunion du Conseil d'Administration, l'après-midi, ont été également exposées les conséquences de la visite de la Commission Départementale de Sécurité dont le rapport est nécessaire pour l'obtention de l'agrément du Ministère du Temps Libre. Nous nous doutions que quelques points seraient à mettre en conformité. Mais nous ne pensions pas que certaines exigences nous obligeraient à des travaux importants : il nous faudra enlever les tapisseries du grand escalier et des couloirs et les remplacer par une tapisserie collée. Travail important si l'on considère que c'est, entre autre, l'état des murs qui nous avait fait choisir la tapisserie sur baguettes. L'enlèvement de la tapisserie pourra se faire avec les moyens « du bord », mais la réfection des murs et de l'électricité, la mise en place d'un nouveau revêtement vont nécessiter une main-d'œuvre importante et des achats de matériel non moins importants. Il ne s'agit que d'une péripétie regrettable qui ne mettra pas en péril les finances de la M.C.E. mais les sommes ainsi utilisées ne pourront pas l'être pour d'autres travaux prévus. La réfection de l'électricité dans les salles à manger est repoussée à une date ultérieure ainsi que l'installation des w.c. des campeurs. La réfection du système d'évacuation des eaux usées, surtout de la cuisine, sera peut-être retardée et pourtant elle s'avère urgente. Enfin le Syndicat Intercommunal d'Electricité a répondu favorablement à notre demande de renforcement de la ligne d'alimentation. Cela nous occasionnera sans doute quelques frais d'adaptation au départ du compteur.

La saison d'été s'annonce, pour l'instant, comme la précédente, assez déséquilibrée, juillet étant chargé et août beaucoup moins. A la demande d'une espérantiste belge, une Rencontre Internationale d'Espérantistes du Troisième Age aura lieu du 18 au 30 juin. Nous espérons que son succès permettra son « institutionalisation » pour les années à venir.

P. BABIN.

INTER NI

La Ĝenerala Kunveno de la 15-a de aprilo ebligis doni precizajn informojn pri la financoj kaj pasintaj agadoj al la ĉeestantoj, kiuj ĉijare estis iom pli multaj ol lastan jaron sed ankoraŭ ne kontentige multaj. Oni denove parolis pri la problemo de la asocianoj, kies kunvokilo regule revenas al ni jam de pluraj jaroj. Kelkaj el ili mortis sed la heredantoj ne manifestiĝis. Eble tiuj pensas « ili konservu la monon » sed tio eblas nur se oni sendas al ni la certigilon aŭ almenaŭ leteron por precizigi la intencon. Listo aperas en tiu numero de Kulturaj Kajeroj. Ni antaŭdankas vin se vi povas helpi.

Alia problemo estas tiu de la Fonduso Belbona Espero, kiu disponigas senpagajn restadojn en Gresillon al gejunuloj. La kandidatoj ne estis multaj, la tutan disponigitan sumon ni ne povis elspezi. Konigu la celon de tiu Fonduso al viaj junaj kursanoj. Vi helpos ilin kaj nin.

Okaze de la kunveno de la konsilianoj, post la elekto de nova estraro, ni parolis pri la postuloj de la Komisiono pri Sekureco. Ni devas demeti la tapetojn de la ŝtuparejo kaj de la koridoro kaj anstataŭe glui murpaperon. Tio devigas nin prokrasti kelkajn antaŭviditajn investojn. Ni atendu la financan rezulton de la venonta somera sezono.

Pri tiu somera sezono, ĝi, ankaŭ ĉijare, estos malekvilibra kun plenplena julio kaj malpli plena aŭgusto. Do profitu, ke restas kelkaj liberaj ĉambroj por aŭgusto. Sed tamen, rapidu.

Sociétaires dont nous sommes sans nouvelles depuis de nombreuses années

Nous aimerions connaître la nouvelle adresse des amis dont la liste suit ou, en cas de décès, savoir comment contacter les héritiers. Pouvez-vous nous aider ? Merci.

ALGLAVE Michel, Albi.
AMIARD Hélène, Le Havre.
APCHER Georgette, Isle/Sorgue.
ARNOULD Louise, Bourbonne.
BUCHET Paul, Tassin.
CARY Alexis, Colombes.
CHALUMEAU Mme, Paris.
MONNIER, Arras.
COUPEAU René, Le Mans.
CURNELLE Mme, Lambersart.
DESPEYROUX Mme, Lyon.
FABER Suzanne, Chelles.
FRANÇOIS Gabriel, Paris.
GIMEL Raymonde, Cusset.
GRANIER Marthe, Digne.
GUITTON André, Guyancourt.
HONORE Mme, Paris.
JOUBERT, Angers.
JOUIS Edgard, Bois-Guillaume.
LACOUR Louis, Thiers.
LOISON Paule, Bois-Guillaume.
MANUEL Rose, Nevers.
NOYES Mme, Tours.
PLUCHON Gaston, Saint-Martin-de-Ré.
POIRIER Anne-Marie, Montargis.
REYNAUD Georgette, Nîmes.
ROUX Daniel, Hay-les-Roses.
ROY Henri, Chaponost.
SARRUT Robert, Langogne.
SCHMITT Eugène, Ramonville.
TIBLE Jean-Marie, Sao-Paulo.
VALLEIX Marie-Thérèse, Clermont-Ferrand.

ASSEMBLEE GENERALE DU 15 AVRIL 1984

L'Assemblée Générale Ordinaire des sociétaires de la Maison Culturelle des Espérantistes Français s'est réunie le dimanche 15 avril 1984. Le nombre des membres présents et représentés était de 286 pour un capital de 83 900 francs.

Le quorum étant atteint la séance est ouverte à 10 heures par Monsieur BOYET Fernand, élu président de séance.

RAPPORT FINANCIER. — Le compte d'exploitation et le bilan sont présentés par le trésorier Dominique BABIN. Ce dernier explique que le stock librairie a fortement augmenté du fait de la 4e édition de « Por la Praktikantoj » dont les exemplaires maintenant disponibles représentent environ 50 % de ce stock. Le compte séjour est en augmentation par rapport à 1982 en raison de l'augmentation des tarifs mais aussi par le fait que le séjour des animateurs a été compté en recette séjour pour apparaître aussi en « dépenses culturelles », ce qui avait été décidé par l'Assemblée Générale du 1er-5-83. Le montant global des salaires est en diminution car le jardinier a cessé son travail pour cause de maladie le 14 août. En revanche les charges sociales ne reflèteront cette diminution que sur le budget 1984, les charges du 4e trimestre étant payées au premier trimestre de l'année suivante.

Le bilan est ensuite examiné. Si les disponibilités fin 1983 sont inférieures à celles de la fin 1982 cela est dû en grande partie au fait que,

fin 1982, étaient pris en compte le « prêt service d'eau » et le « fonds photocopieur » qui ont été entièrement utilisés en 1983. L'examen du passif amène des remarques sur le chapître « parts sociétaires ». Le problème des sociétaires décédés ou disparus et dont les parts restent comptabilisées en raison du manque d'information sur le sort qui doit leur être réservé, reste en suspens. Un additif à l'article 7 des statuts disant que « la qualité de sociétaire se perd en cas de non-réponse aux convocations pendant 10 années consécutives » est accepté à l'unanimité. Cet additif sera proposé à la Préfecture. Une liste des membres dont nous sommes sans nouvelles sera publiée dans Kulturaj Kajeroj. Bilan et compte d'exploitation sont acceptés après quitus donné par les commissaires aux comptes, messieurs Cortès et Lafargue.

Le président de la M.C.E. commente ensuite le *rapport d'activités*. En ce qui concerne la Fonduso Belbona Espero il est répété que le capital de ce fonds spécial n'appartient pas à la M.C.E. et que par conséquent sa gestion ne peut pas paraître au bilan. Ce capital a donné un intérêt de 7312 francs dont 5000 ont été ajoutés au capital pour conserver à celui-ci une valeur constante. La différence, soit 2312 francs, a été affectée, selon le désir de la fondatrice, à des séjours. Il est regrettable que les bénéficiaires des séjours gratuits ne soient pas encore assez nombreux. Une partie de la somme affectée à 1983 sera attribuée en 1984. La venue à Grésillon de Louis-Nicolas et Francizka Babin est également commentée. Les explications avaient déjà paru dans Kulturaj Kajeroj. L'Assemblée Générale de 1985 pourra juger des premiers résultats. Le rapport d'activités est accepté à l'unanimité.

Les bulletins de vote pour le renouvellement d'une moitié du Conseil d'Administration ont été dépouillés par Mmes Cheverry et Bénistant. Les résultats sont donnés :

Nombre de votants : 251. — Blancs ou nuls : 3. — Exprimés : 248.

Ont obtenu :

Marcel BODEREAU : 248 voix.
Guy DAIRON : 248 voix.
Fred. LEMAGADURE : 248 voix.
Renée LENEL : 248 voix.
Thérèse MICARD : 248 voix.
Janine VINCENT : 231 voix.

Tous les candidats sont élus.

QUESTIONS DIVERSES. — Le président de la M.C.E. aborde le problème de la demande d'agrément de la Maison Culturelle par le Ministère du Temps Libre, de la Jeunesse et des Sports. Les visites des inspecteurs de la Direction départementale du Temps Libre d'une part, et de ceux de la Direction départementale des Affaires Sanitaires et Sociales d'autre part, n'ont pas donné lieu à de grandes surprises. L'évacuation des eaux usées par exemple devait être revue (devis en cours). En revanche la visite de l'inspecteur de la Sécurité va nous obliger à de gros frais inattendus. En effet, entre autres rectifications sans grande importance, il nous est imposé de remplacer la tapisserie de l'escalier et du couloir par un autre revêtement collé. Heureusement la Direction départementale nous accorde un délai de six mois. Mais ce sont autant d'autres investissements qui ne pourront pas être faits.

L'ordre du jour étant épuisé l'Assemblée Générale est close à 12 h. 30.

La secrétaire de séance,
J. Turbillon.

Réunion du Conseil d'Administration du 15 avril 1984

Le Conseil d'Administration procède tout d'abord au renouvellement de son Bureau. Ont été élus ou réélus à l'unanimité :

Président : Pierre BABIN.
Vice-Présidente : Bérengère CHEVERRY.
Secrétaire : Guy DAIRON.
Trésorier : Dominique BABIN.

Les sujets essentiels ayant déjà été débatus à l'Assemblée Générale, le président rappelle le programme de 1984.

PRINTEMPS. — Stage agréable mais dont on peut regretter le nombre insuffisant de participants : 25 exclusivement français. Pâques étant très décalé par rapport à nos vacances scolaires, les congés des écoles étrangères ne correspondaient pas avec les nôtres. Les cours ont été très bien suivis et les soirées très réussies.

WEEK-END DE PAQUES. — 108 Italiens sont annoncés en deux groupes : un de Milan, et un de Vérone, un pour trois jours, l'autre pour quatre jours en demi-pension. En revanche, le séjour d'un groupe finlandais a été annulé : difficulté pour obtenir des devises semble-t-il. Une amie belge qui voudrait rencontrer certains de ses correspondants à Grésillon a proposé que nous fassions un stage pendant les deux dernières semaines de juin. Une rencontre internationale d'espérantistes du troisième âge a donc été mise sur pied. Elle aura lieu du 18 au 30 juin.

Pour les stages d'été le nombre des inscriptions est sensiblement le même que l'an dernier à la même époque. Pour fin septembre on nous a demandé de recevoir une rencontre de retraités des P.T.T.

La séance est levée à 16 heures.

Le secrétaire,
Guy DAIRON

GRAND SUCCES

de la quatrième édition de

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. BABIN

Illustré par L. Poueymarie.

« Vigla lernolibro por la praktikanto »

—

Prix inchangé : **25 F.** — Rabais habituel aux groupes et aux Libro-Servoj.

—

Commandes à : J. Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

VOUS NE POUVEZ PAS

suivre un cours oral dans votre ville ?

Pourquoi ne pas essayer nos

COURS PAR CORRESPONDANCE

POUR LES DEBUTANTS : 16 leçons illustrées avec de nombreux exercices permet d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : **100 F.**

COURS DE PRATIQUE : 14 leçons illustrées. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : **100 F.**

NIVEAU SUPERIEUR : versions, thèmes, études de textes ; histoire de l'espéranto et du mouvement espérantiste. Cours et corrections : **70 F.** Notre Libro-Servo peut fournir les livres qui vous manquent.

***

Inscriptions et chèques à : Maison Culturelle Espérantiste, 49150 Baugé — C.C.P. Nantes 1485-39 P.

LIBRO - SERVO

Notre catalogue est à votre disposition. Nous vous le ferons parvenir contre un timbre-poste. Nous pouvons vous fournir tous les livres non épuisés et toutes les nouveautés.

Faites vos commandes sur lettre de préférence. Si vous êtes sûr du montant de la commande, joignez un chèque.. Sinon attendez la facture qui sera jointe à l'envoi.

N'oubliez pas que les envois se font **franco au-dessus de 200 francs.**

Adressez vos commandes à : J. VINCENT, B.P. 54, 49150 Baugé.

Intitulé des chèques : Maison Culturelle Espérantiste.